# TEJO-aktuale: numero 50, 2002-02

## TEJO-SEMINARIO EN LITOVIO: LA KOTIZOJ DUONIGHIS

Danke al shparema preparlaboro, la organiza teamo de la sekva TEJO-seminario sukcesis duonigi la kotizojn, kiuj nun estas:
TEJO-membroj: A-landoj: 30 EUR, B-landoj: 20 EUR;
ne TEJO-membroj: A-landoj: 53 EUR, B-landoj: 38 EUR.

Ankorau restas liberaj lokoj! Pliaj informoj: http://www.tejo.org/ seminarioj/aktiva_civitaneco.jsp.

## TEJO.ORG: DUA KAJ TRIA PASHOJ

Pretas la dua pasho de la retpagharo de TEJO http://www.tejo.org: nun vi trovas informojn pri la chefaj aktivajhoj kaj eblas mem kontribui per la forumo, aranghoj de Landaj Sekcioj kaj gastlibro.
En la tria pasho ni esperas aldoni: "elshutejon", "ludejon" (priskriboj de diversaj ludoj), "sinprezentejon" (kie TEJO-anoj povos prezenti sin mem), "projektejon" (por prezenti projektojn kaj trovi kunlaborantojn) kaj korespondan servon. Chio chi pretos iom post iom dum la printempo/somero. Ideojn pri la pagharo sendu al ttt@tejo.org, kaj ne hezitu alighi al la retlisto http://groups.yahoo.com/group/tejo-ttt.

## FRAPFRAZIGU TEJO-N: LIMDATO PROKRASTITA

Kiel jam anoncite, TEJO serchas sloganon por prezenti sin al esperantistoj kaj neesperantistoj. Vian proponon vi povas sendi al Hokan Lundberg, Fisksatra Torg 12, SE-13341 Saltsjobaden, Svedio, frapfrazo@tejo.org: la premio estos TEJO-T-chemizo kun la elektita frapfrazo. Por ebligi la partoprenon ankau al neretanoj, la limdato estas prokrastita al la 30a de junio, do vi havas pli da tempo por cerbumi!

## VERKOKONKURSO EN "KONTAKTO": DUA ANONCO

"Kontakto", la socikultura revuo de TEJO, anoncas grandan verkan konkurson. Temo: "Mia Kontakto": skribu, kio estas interesa kaj ghojiga por vi, pri kio vi shatas legi, kiuj artikoloj vin impresas... Formo, longeco kaj stilo libere elekteblaj. En la konkurso ekzistas tri kategorioj lau lingvaj niveloj: ordinara, facila kaj tre facila. La gajnintaj konkursajhoj aperos en Kontakto kaj la autoroj ricevos valorajn premiojn. Limdato por forsendo: 30a de majo 2002. Sendu viajn konkursajhojn (kun viaj nomo, agho, adreso kaj lau kiu nivelo vi verkis), al: Kontakto, p/k 89, UA-01030 Kiev-30, Ukrainio kontakto@esperanto.org

## INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO EN HUNGARIO

Szekesfehervar (Hungario), 25-31 Julio 2002: Internacia Junulara Semajno (IJS), la plej granda Europa Esperanto-arangho en la venonta somero.

Informoj: esperanto@vianovo.hu